

PREZO: 1,- Kr.

Stare-Tryckarief, Stockholm 1944.



MALGRANDA

N:RO 2 **REVUO** 1944

2-a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
Kion la tempo postulas de ni?, de P. Th. Justesen	1
Kiel la finnoj vivas dum la milito, de Hannes Koivu	3
La signifo de malpezeco ĉe aviadiloj, de Fred Turner	6
La arto de pensado, de Alf Ahlberg	10
La angla karaktero, de K. R. C. Sturmer	21
Kristnaskaj pensoj, de Antti Rasku	24
Knabo kaj birdo, de Stellan Engholm	25
Mortis Gunnar Furhammar, de Stellan Engholm	30
Nokto, de Stellan Engholm	31
Literaturo	32

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Kion la tempo postulas de ni?

De P. TH. JUSTESEN

Oni certe povas diri, ke grandpaŝe proksimiĝas la plej sortograva momento de la mondhistorio, tiu momento, kiam finiĝos la plej granda kaj plej terura el ĉiuj ĝisnunaj militoj kaj donos lokon al — ni esperu tion — la plej longa kaj fruktodona paĉperiodo, kiun la historio konas. Tiu momento faros grandegajn postulojn al la tuta homaro. Komprenoble ĝi faros postulojn ankaŭ al ni. Sed kiujn? Antaŭ ĉio tiun, ke ni montru, ke ni ekzistas.

Ni ja estas firme konvinkitaj, ke la mondo nun pli ol iam antaŭe bezonas internacian helplingvon. La trafikiloj faris la mondon malgranda, kaj ili konstante pli kaj pli malgrandigas ĝin. Samtempe la radio, precipe nun dum la milito, montris eĉ al la plej blindaj la internacian bankroton de la naciaj lingvoj. Kiam la angla radioservo por trovi kontakton kun la mondo ĉiutage devas sendi informojn en pli ol 40 lingvoj, tiam la afero jam estas karikaturato. Se esperanto ne ekzistus, ni nepre devus inventi ĝin. Sed ĝi ekzistas, kaj precipe tiu, kiu perdos la militon, rapide eltrovos tion, ĉar li treege bezonos ĝin kiel defendilon kontraŭ la lingvo de la venkinto. Sed ne nur la venkinto — la tuta mondo devas kiel eble plej baldaŭ lerni kompreni, ke estas valora kaj necesa tiu lingvo, por kiu ni laboras. Tial ni montru, ke ni ekzistas. Sed kiel?

Ĝuste la pacinterkonsento donos al ni unikan eblon. En kelo en Parizo oni konservas la normigan metromezurilon, tium, laŭ kiu oni rekte aŭ nerekte ĝustigas ĉiujn mezurilojn en la mondo. Kiam la packontrakto iam estos subskribita kaj aperigita, unue en la germana kaj la angla sed poste ankaŭ en ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo, ni devos krei normigan tekston, kiun povos legi ĉiuj popoloj en la mondo — se ili komprenos, kion la tempo postulas. Ni havas inter ni kaj lingvo- kaj stilartistojn, homojn, kiuj povas ne nur formi esperanton sed ankaŭ plene posedas la grandajn kaj malgrandajn lingvojn de Eŭropo. Ni donu al la plej bonaj el ili la taskon traduki la packontrakton en esperanton, kaj ni aliaj havigu la rimedojn por presigi tiun tradukon kun arta eksterajo, sur plej bona papero, per plej bela preso, en artaj koloroj. Tio estus propagandilo, kiun neniu jetus en la paperkorbon, kaj oni devus sendi ĝin kiel historian memoraĵon al la gvidantaj ŝtatestoj en ĉiuj landoj kaj plue al aliaj multinflujaj personoj, ĉe kiuj estus grave vekti intereson.

Sed kompreneble tiu memordonaco estu sendota ne de IEL nek de SAT nek de UEA. Ĝi devos veni de la tuta internacia esperantomovado, en kunlaboro aŭ — post kuniĝo.

Per tio mi venas al dua tasko, kiun la momento donas al ni. Post tiu mondkatastrofo, kiu estos finita, kiam ĉesos la bruoj de la armiloj, post la silento, en kiu ni dum jaroj vivis, ni ne povos denove komenci kiel tri internaciaj organizoj. Ni devos eniri en pli altan unuecon kaj en tiu komenci denove. Se SAT eventuale ne konsentos pri tio, IEL kaj UEA ĉiukaze devos uzi la momenton por renaskiĝo, ne post malgrandanimaj intertraktoj kaj egoisma batalo, ne kiel venkinto kaj venkito sed kiel fratoj, kiuj volas la samon kaj volas kune labori. Tion, mi kredas, deziras kaj volas ĉiuj esperantistoj. Ni esperu, ke la gvidantoj komprenas la sugestojn de la tempo!

Kiel la finnoj vivas dum la milito

De HANNES KOIVU

Multmaniere la milito ŝanĝas la vivon de popolo. Ne nur tiuj, kiuj servas ĉe la fronto, sed ankaŭ aliaj devas kutimiĝi al tute nova vivmaniero kaj la plej multaj ankaŭ al novaj laboroj. Jen kelkaj vortoj pri la nuna vivado de finnoj.

Laboroj.

Ĉar la junaj kaj mezaĝaj viroj forestas el la hejma fronto, la restintaj, nome la infanoj, maljunuloj kaj precipe la virinoj devas zorgi pri la necesaj taskoj. Tiel ekzemple la homoj, kiuj pli frue ne faris pezan korpan laboron, vendistinoj, instruistinoj kaj aliaj devas laŭ ordono iri en arbaron por segi kaj haki hejtlignon (virinoj ekz. 1—10 kubmetrojn). Somere ili devas labori kelkan tempon (de kelkaj tagoj ĝis du aŭ tri monatoj) en iu kampara bieno. Ekzemple la geinstruistoj havas devon labori dum sia venonta somera libertempo 82 tagojn en labortendaroj aŭ bienoj aŭ en aliaj urĝaj okupoj. La malnova kutimo fari urĝajn laborojn per t. n. laborfestenoj (finne "talkoo") estas uzata en multaj novaj formoj. La homoj, kiuj ne havas okazon fari tiun sensalajran talkoo-laboron, aliĝas al t. n. lundo-talkoo, kie oni donacas por komunitala celo sian salajron de unu horo en ĉiu semajno (laŭ origina intenco la salajron de unua laborhoru en lundo). Ankaŭ la infanoj partoprenas serioze kaj multmaniere tiun labor konkurson.

Vivbezonaĵoj.

Estas tute nature, ke ekzistas manko de multaj vivbezonaĵoj, ĉar komerco eksterlanden preskaŭ ĉesis, kaj la fabrikoj nur iomete produktas. La plej grava estas manko de vestaĵoj kaj ŝuoj. Multspecaj surogatoj estas elpensitaj. El papero estas farataj matracoj, kurtenoj, tapiŝoj, mansaketoj, naztukoj kaj ĉe ŝuoj kun lignaj plandoj. Nutr-

ajoj sufiĉas pli bone, de kiam Karelio denove donas grenon. La oficiale distribuataj nutraĵoj tamen ne estas abundaj, kaj tial kontraŭleĝa komerco per butero, porka viando ktp. en "nigra borso" bedaŭrinde bone prosperas. Tion ebligas almenaŭ parte la milda rilatiĝo de la ŝtato al la bienuloj.

Loĝejoj.

Pro la detruigo de domoj ekzistas ĉie en la lando severa manko de loĝejoj. Estas kalkulte, ke ekzemple en Viipuri (Viborg) nur 8 % el la loĝejoj restis nedetruitaj. Mi supozas, ke tiu nombro per rekonstruo jam duobligis, sed la loĝantaro samtempe atingis 30—40 % el la antaŭmilita nombro, malgraŭ la severa kontrolo pri transloĝigo. Tial oni devas uzi ankaŭ ĉiujn kelojn kaj ejojn, kiuj efektive ne devus esti taŭgaj kiel loĝejo. Ĉar en multaj urboj, precipe en Helsinko, fenestrovitroj grandparte estas rompitaĵoj, oni ordonis, ke neniu rajtas sen aparta permeso uzi duoblajn fenestrojn, ĉar la internaj fenestroj devas esti konservataj por la okazo, ke la eksteraj eventuale rompiĝos. Estas ankaŭ konsilite, ke parto el la fenestrovitroj estu ĉiam anstataŭita per kartono, por ke restu kiom eble longe almenaŭ unu vitro por ĉiu fenestro. La montraĵoj fenestroj de magazenoj estas plejparte kovritaj per ligna muro, kiu havas fermeblajn pordetojn.

Vivdanĝero.

Malgraŭ tio, ke nia milito ĉe la fronto dum longa tempo preskaŭ ĉesis, ekzistas ĉe la hejma fronto ĉie en la lando vivdanĝero pro aeratakoj. Multaj tagoj kaj eĉ semajnoj povas en iu loko pasi sen alarmoj, sed alifoje povas en unu tago aŭ nokto okazi kvin aŭ eĉ dek alarmoj. Laŭ ordonoj oni devus dum la alarma tempo esti en ŝirmejo (kelo aŭ alia ejo), sed se ne estas aŭdata bruo de bombardado aŭ defendo, la homoj nur malrapideme obeas, kaj kie la kontrolo ne estas sufiĉe severa, multaj restas sur la stratoj aŭ en siaj loĝejoj. En malgrandaj urboj, kie la domoj plejparte estas lignaj, la keloj ne multe ŝirmas. En Viipuri,

kie dum la nuna milito ne okazis severaj aeratakoj, la alarmoj nur malmulte aliigas la stratan vivon. Neniu iranto plirapidigas siajn paŝojn, kaj infanoj eĉ ne ĉesas ludi sur la trotuaroj. Aspektas, kvazaŭ la homoj estus tute surdaj. Des pli kontraŭvole la homoj nokte eliras el siaj litoj por iri en ŝirmejon, se tia ekzistas. La homoj kutimiĝas ne atenti vivdanĝeron, se ĝi ne estas tute videbla. En sudaj marbordaj urboj la lernejoj ne funkcias, kaj la infanoj estas grandparte evakuitaj. Dekmilojn da finnaj infanoj akceptis niaj afablaj gefratoj en Svedujo.

Rilato al la milito.

Kiam ni aŭskultas eksterlandajn radiostaciojn (multaj ja disaŭdigas ankaŭ en finna lingvo), ni rimarkas, ke eksterlandanoj plejparte havas tute malĝustan komprenon pri nia rilato al la milito kaj al la ideoj, por kiuj oni en la granda milito laŭ asertoj batalas. En nia parlamento la partio, kiu subtenas la ideojn de la akso-ŝtatoj, havas 4 procentojn el la deputitoj. La partio konsistas el kelkaj inter si batalantaj grupoj kaj estus tute sensignifa, se ĝi ne farus malutilon per siaj gazetetoj parolante en la nomo de la popolo. Komunistoj laŭleĝe ne ekzistas, ĉar la partio estas ĉesigita pro sia ŝtatperfida agado. Pli frue la partio havis en la parlamento meznombro 10 proc. el la deputitoj. Ĉiuj aliaj partioj subtenas la demokratian reĝimon. Oni do devus kompreni, ke ni ne partoprenas la mondmiliton por akceli la ideojn de diktaturaj ŝtatoj. Regas preskaŭ centprocenta unuanimeco pri la celo de nia milito. Ni forte deziras pacon, sed ni ĉiuj komprenas, ke la vivo sen nia Karelio, sen la Saima-kanalo kaj sen la gravaj industriaj regionoj, sed kun la giganta militkompenso (kiun ni devus pagi pro tio, ke nia lando estas detruita), ne estus al la popolo ebla. Se ni akceptus la terurajn pakondiĉojn, fariĝus granda mizero, kaj bolŝevismo nin baldaŭ englutus. Kaj pro la spertoj el la mallonga "paca" tempo 1940—41 ni scias, ke tiuj kondiĉoj tuj multobligus, kiam niaj eblecoj por defendo estus forprenitaj.

Malfacila do estas la vivo de finnoj nuntempe, kaj la

estonteco estas kovrita de nigraj nuboj, sed similajn tem-
pojn la popolo jam multfoje en sia historio travivis. Mal-
graŭ tio, ke la Atlanta deklaro baldaŭ verŝajne estos
entombigata apud la 14 paragrafoj de Wilson, ni kredas,
ke maljusto ne povos ĉiam regi en la mondo. En tiu espero
ni vivas.

La signifo de malpezeco ĉe aviadiloj

De FRED TURNER

Por nefakulo moderna flugmaŝino ŝajnas esti sufiĉe
forta kaj stabila konstruaĵo. Ĝi ordinare estas farita el
metalo, kaj la delikataj, draksimilaj aparatoj el kungluta
ligno kaj tuko, kiuj antaŭ dudeko da jaroj nomiĝis acro-
planoj, ŝajnas nun esti nur la unuaj primitivaj eksperi-
mentaĵoj de ne plenevoluinta scienco. Estas tamen fakto,
ke eĉ la plej modernaj flugmaŝinoj estas relative neforti-
kaj konstruaĵoj kompare kun ekzemple fervoja vagono aŭ
aŭtomobilo. Tio dependas de la malpezeco por ĉiu speco
de flugmaŝino. Ankaŭ koncerne aliajn transportrimedojn
oni komencas kompreni la signifon de malpezaj konstru-
aĵoj, kaj la tendenco en ĉiuj inĝenieraj fakoj rilate al
movigiloj estas pli kaj pli vigla intereso por eviti nenece-
sajn kilogramojn. (Ĉe vojrumilo oni bezonas kilogra-
mojn!) Sed estas la gramŝparanta aviado kiu montras la
vojon kaj kreas la grandskalan aluminian industrion, kiu
flanke de la pli malnova fera industrio nun kreskas en ĉiuj
industriaj landoj. Aluminio kaj ties alojoj estas tre altran-
gaj materialoj, kiuj, kvankam ankoraŭ iom multekostaj
kaj ankoraŭ ne tiel multflanke uzeblaj kiel fero kaj ŝtalo,
jam montras sin pli kaj pli ofte en la teknika mondo kaj
la ĉiutaga vivo. Aluminio pezas nur trionon de fero kun
sama volumeno.

Kial do oni bezonas mastrumi tiom zorge la kilogramojn,
hektogramojn kaj gramojn? Unue mi devas klarigi, ke ĉiu

flugmaŝino rajtas havi maksimume unu specialan pezon
nomata plena flugpezo. La fortiko de la sparoj* en la
alroj estas kalkulita por tiu pezo, kompreneble kun certa
minimuma rezervo da fortiko, kaj pligrandigi la ŝarĝon
super la permesita pezo estus danĝera afero, ĉar tiam es-
tus pli granda risko por rompi la alojn. Krome estus pli
danĝere kun tro granda pezo, ĉar ekflugo kaj surterigo
postulus pli longajn kurejojn, ol estas tiuj de normala
aerodromo. La plena pezo estas do fiksita, kaj sekve la
ŝarĝo estas limigita ne nur el vidpunkto de disponebla spa-
co, kio estas ordinara ĉe fervoja vagono aŭ ŝarĝaŭtomo-
bilo, sed ankaŭ, kaj pli grave, el pezovidpunkto. El tio
sekvas, ke ĉiu konstruisto de aviadilo volas fari sian kon-
struaĵon kiel eble plej malpeza, por ke la permesita ŝarĝo
estu kiel eble plej granda. Estas la ŝarĝo, kiu "pagas" por
la vojaĝo. Sed se oni farus la konstruaĵon kaj la motorojn
pli malpezaj, ili eble fariĝus malpli fortikaj. Tiam la plena
flugpezo devus esti malpli alta. Mallonge esprimite, la
aeroplano devas esti kiel eble plej malpeza, sed ankaŭ kiel
eble plej fortika. Ĉiu detalo devas esti konstruata el tiu
vidpunkto, eĉ la plej malgrava; aŭ prefere mi diru, ke spe-
ciale la plej malgravaj detaloj, ĉar ĉe ili la pezo faras plej
malgrandan utilon. En neniuj aliaj kampoj de la inĝeniera
arto troviĝas la sama atento al malgravaj detaloj. Moder-
na flugmaŝino konsistas el kelkaj miloj da diversaj partoj,
kaj ĉiu parto prezentas okazon eviti pezon, kilogramojn,
hektogramojn aŭ nur gramojn. "Sed tio estas nur baga-
telo", ekkrias la novulo en aviada desegno, kiam lia ĉefo
atentigas pri ebleco ŝpari materialon. Tamen kelkmil baga-
teloj povas signifi multajn kilogramojn, kaj multaj kilo-
gramoj signifas multan monon, kiel mi poste montros.

Kiel ekzemplon ni povas imagi modernan grandan ko-
mercan aviadilon kun kvar motoroj kaj loko por ŝarĝo kaj
pasaĝeroj. La pezoj povus esti proksimume la jenaj:

fuzelo kaj empeno	4.000 kg	15,5 %		
interna ekipaĵo	1.000 kg	3,9 %		
sumo, fuzelo			5.000 kg	19,4 %

*) Vortklarigoj en la fino.

aloj	4.000 kg	15,5 %		
4 motoroj	5.000 kg	19,4 %		
benzinuoj ,oleuoj	300 kg	1,2 %		
subekipaĵo (radioj ktp)	1.400 kg	5,5 %		
sumo, aloj			10.700 kg	41,6 %
taro (pezo sen ŝarĝo)			15.700 kg	61 %
utila ŝarĝo			10.000 kg	39 %
plena flugpezo			25.700 kg	100 %

La utilan ŝarĝon oni povas dividi diverse, depende de la flugota distanco. Oni kalkulas la bezonatan kvanton da benzino konsiderante la eblecon de kontraŭa vento kun rapido de 60 kilometroj hore, kaj krome kun duhora rezervo. La sumon de la tara pezo kaj la pezoj de la brul-aĵo, la oleo kaj la aviadistoj oni poste subtrahas de la plena flugpezo, kaj la resto estas la permesita speza ŝarĝo aŭ komerca ŝarĝo. Jen estas tri alternativoj kun sama utila ŝarĝo de 10.000 kg:

distanco km	benzino litroj	benzino kg	aviadistoj kaj oleo	ekzemple:		
				speza ŝarĝo kg	passaĝeroj	alia ŝarĝo
1.000	4.000	2.800	700 kg	6.500	30	4.100 kg
2.000	6.400	4.500	700 kg	4.800	25	2.800 kg
4.000	11.200	7.840	860 kg	1.300	14	180 kg

El ĉi tio ni vidas, ke la speza ŝarĝo estas nur 5 % de la plena pezo por la distanco 4.000 km, sed estas 25 % por 1.000-kilometra distanco. La kosto de la vojaĝo estas dividita inter nur 14 personoj en la unua okazo sed inter 30 personoj kaj 4.000 kg da ŝarĝo en la dua. La graveco de la tara pezo estas kompreneble des pli granda, ju pli longa estas la flugota distanco.

Kion signifas ĉi tio esprimita per mono? Se oni prenas la mezan distancon 2.000 km kiel verŝajnan ekzemplon kaj supozas, ke la bileta kosto estas la sama kiel por unua-klasa bileto ĉe la fervojo (proks. 20 oeroj por kilometro), oni venas al la rezulto, ke ĉiu pasaĝero devas pagi 400 kronojn por la vojaĝo. La tuta uzotempo de la flugmaŝino estas proksimume 10.000 aŭ 15.000 flughoroj kaj la meza rapido ĉirkaŭ 300 kilometroj hore. Sekve estas la tuta flugdistanco inter 3 kaj 4,5 milionoj da kilometroj. Se oni

supozas, ke la sidlokoj estos uzataj por 90 % de la plena distanco, oni povas kalkuli la tutan enspezon al la posedanto de la aeroplano por unu sidloko. Ĝi estas minimume

$$0,9 \times 0,20 \times 3.000.000 = 540.000 \text{ kronoj.}$$

La flugdistanco dum unu jaro povas alproksimiĝi al duonmiliono da kilometroj, kaj la enspezo por unu sidloko estas tiam jare 90.000 kronoj. Aeroplanposedanta kompanio havas ankaŭ grandajn elspezojn, ekzemple por benzino, oleo, salaĵo al aviadistoj, aerodromkostoj, administraj kostoj, elspezojn por reklamo ktp. Sed tiuj elspezoj estas preskaŭ sendependaj de la nombro de sidlokoj en nia pensita aeroplano. Se la konstruistoj per spaco-kaj pezoŝparanta lerto povus fari ankoraŭ unu sidlokon en la aviadilo, la elspezoj de tiu plua sidloko estus pura profito por la kompanio. Kontraŭe, se la konstruistoj pro fuŝo aŭ zorgomanko farus la nombron de seĝoj unu malpli, la monperdo estus 90.000 kronoj jare.

La pezo de unu pasaĝero kun seĝo kaj pakaĵo estas 100 kg. Tial valoras unu kilogramo da ŝparita pezo 900 kronojn jare, kaj entute por la almenaŭ sesjara vivo de aviadilo ĝi valoras pli ol 5.400 kronojn. Oni povas argumenti, ke verŝajne mankus loko por pli da seĝoj, eĉ se oni malpli-grandigus la taran pezon. Anstataŭ pasaĝeroj oni prenu do pli da alia ŝarĝo, kiu postulas malpli da spaco. Eĉ se la kilograma enspezo de poŝto k.t.p. estas nur kvarono de tiu de pasaĝeroj, la ŝparita kilogramo valoras tamen pli ol 1.000 kronojn.

Fakvortoj.

La fakvortoj estas prenitaj el AERONAŬTIKA TERMINARO de E. D. Durrant en la jarlibro de IEL 1941, dua parto.

Alo = flanko, parta parto de flugmaŝino, "flugilo".

Empeno = la stabiligaj kaj reguligaj partoj en la malantaŭa parto de flugmaŝino — vosto.

Fuzelo = aeroplana trunko.

Kurejo = vojo por starto kaj surteriĝo de flugmaŝino.

Planéo = "Alo-forma korpo, kies ĉefa funkcio estas produkti levadon".

Sparo = "ĉefa laŭlonga struktura membro de planeo aŭ reguliga surfacaĵo".

Speza ŝarĝo = pagata, enspezodona ŝarĝo.

La arto de pensado (Dua parto)

De ALF AHLBERG

Ni nun supozu, ke ĉiuj antaŭe diritaj malhelpoj por la pensado estas for. Tio estas pensa eksperimento, kiun oni neniam povas plene realigi. Ni ne imagu, ke iu el ni pensas "libere" en tiu signifo, kiun ni donis al la vorto. Sed se vi ne havas volon tion fari, ne havas sencon interparoli plu pri pensado. Tiukaze vi kredeble estas "pravpensanto" en iu signifo de la vorto — sed neniam vi pensos prave. Se kontraŭe vi havas volon pensi "libere", t. e. forigi de vi la sekretajn reĝizorojn, kiuj fuŝas la penso-proceson, vi certe per konstantaj memobservo, memdisciplino kaj memkontrolo povos atingi sufiĉe multe en libera pensado. Ni ofte estas tro suspektemaj rilate al aliaj; kial ni ne estu iom pli suspektemaj al ni mem? Kiam vi kun sankta kaj flama patozo pledas por ekz. "la homaro", "la justo", "la libero", tiam certe ne malutilus al vi iom pripensi, ĉu ne inspiras vin ankaŭ viaj malgrandaj privataj interesoj. Ĉu vi same fervoras por "justo", kiam estas malavantaĝe por ili?

Sed la volo pensi libere ankoraŭ ne estas garantio por prava pensado. Ĝi estas nur la negativa kondiĉo. Se oni starigas konuson sur ĝia pinto, ĝi povas fali al kiu ajn flanko. Sed tio ne signifas, ke ĝi nepre falas al la ĝusta flanko.

Unue, kion signifas pensi prave? Cetere, kion signifas pensi? Ne malutilas unue klarigi al ni tion.

Eble sonas strange, ke pensado estas agado, tiel tamen estas. Kutime ni rigardas la "palecon de pensado" kaj la "koloron helan de decido" kiel kontraŭaĵojn, faras diferencon inter homoj de pensado kaj homoj de agado, sed tio estas iom artefarita klasigo. Pensado estas "praktika" agado same multe kiel agado per la manoj. Kaj en ĉiu tia agado oni devas apliki ĝustajn kaj efektivajn metodojn.

Kia agado estas pensado? Supozu, ke vi troviĝas en malfacila situacio, kiun vi devas majstri. Vi estas ekzemp-

le enfermita en ĉambro, el kiu vi provos eliri. Eble ekzistas nur unu maniero fari tion, sed vi ne konas ĝin. Kion vi faras? Eble vi blinde kuras tien kaj tien, puŝas la kapon kontraŭ la murojn kaj skuas la pordanson, ĝis vi post multaj vanaj klopodoj hazardas faras tiujn agojn, kiuj liberigas vin. Tiukaze vi solvis la problemon sen pensi. Sed vi ne povos refari tion, se vi denove estos en simila situacio. Vi ne scias, kial ĝuste tiuj agoj donis rezulton. Sed eble vi anstataŭe faras jene: unue vi zorge esploras la situacion, observas la eventualajn eblecojn, formetas kelkajn el ili, elektas fine unu el ili, konsideras kiel vi uzu ĝin, faras planon, kiun vi realigas. Tiukaze vi solvis la problemon per pensado, vi scias, kial vi agas en tia maniero, kaj kial ĝi donas rezulton.

Ĉiu solvado de tasko, demando, problemo, de plej simplaj ĝis plej komplikaj, estas agado de tiu speciala speco, kiun ni nomas pensado. Kaj la procedo en la dirita ekzemplo povas validi kiel pramodelo por ĉiu pensado. Certa situacio direktas al ni certajn demandojn, instigas al certa agado, donas certajn problemojn por solvi. Detektivo, kiu devas solvi kriminalproblemon, unue zorge kolektas ĉiujn faktojn en la afero. Nenio estas tro sensignifa. Eble estas la ŝajne plej sensignifaj cirkonstancoj, kiuj fine kaptas lian atenton kaj donas al li gvidfadon. Li komencas analizi tiun komplekson de faktoj, dismetas ĝiajn partojn, faras hipotezon, prilaboras tiun kaj elpensas rimedojn por kontroli, ĉu ĝi estas prava. Tuta serio da agoj estas necesa por solvi la enigmon. Principe same procedas matematikisto, historiisto, ekonomiisto.

Pensi "prave" signifas, ke oni en certa situacio reagas en la ĝusta, efika kaj rezultodona maniero; ke oni perceptas la demandojn, kiujn la situacio starigas, zorge observas la komplekson de faktoroj, el kiuj ĝi konsistas ("analizas" ĝin), faras la ĝustajn konkludojn kaj kontrolas ilin.

Jam antaŭ longe oni komencis kunmeti amason da reguloj kiel metodon por la ĝusta pensado. Sistema kunmeto de tiuj reguloj estas tio, kion oni nomas "logiko". Ne estas malutile konatiĝi kun ili, kaj ilia starigo signifas certan

ordigon en la homa cerbo. La plej multaj el tiuj reguloj estas aŭ tiel memkompreneblaj, ke oni ne riskas peki kontraŭ ili, aŭ ili estas tiel komplikaj, ke oni ne atentis pri ili, kiam oni efektive pensas — tamen estas interese kaj utile vidi ilin klare prezentitaj. Sed ne lernu ilin parkere, kiel oni almenaŭ antaŭe faris en niaj lernejoj, tio ne havus sencon. En ekzerco pri realaj kaj praktikaj taskoj vi pli bone uzos la tempon kaj pli bone lernos pensi.

Ni ankaŭ ne intencas prezenti tie ĉi la regulojn de la logiko sed doni kelkajn praktikajn konsilojn, kiujn ni opinias utilaj por tiuj, kiuj volas lerni pensi prave.

La arto de observado.

Pensi signifas reagi en certa situacio, kaj la unua paŝo survoje al ĝusta pensado estas ĝuste observi la situacion. Kun mirige inertaj okuloj oni iras tra la vivo. Infano ĉion vidas, ĉiuj objektoj faras demandojn al ĝi. La plenkreskulo rigardas la ĉirkaŭan realon pli "ĝenerale". Por li la objektoj pli vere estas reprezentantoj por objektogrupoj ol individuaj kaj konkretaj objektoj. Se vi elmemore provos desegni objekton, kiun vi ĉiutage vidis, vi eble rimarkos, kiel malmulte vi vidis de ĝi. Oni ne povas desegni "ĉevalon ĝeneralan", ĉar tia besto ne ekzistas. Ekzistas nur konkretaj kaj individuaj ĉevaloj. Desegnado estas jam bona ekzerco en pensado, ĉar ĝi igas nin observi. Ĝenerale ekzerco de la sensoj estas preparlernejo por pensado.

Tamen ne sufiĉas observi forte kaj klare, kiam oni pensas pri iu situacio; oni devas ankaŭ lerni elekti la esencan, la decidan, kapti certajn gravajn detalojn, distingii, en kio ĝi similas al kaj en kio ĝi diferencas de aliaj similaĵoj. Rimarku kiel poeto priskribas ion, homon aŭ beston. Li ne diras amason da detaloj, kiujn nia imagopovo ne povus kunteni. Anstataŭe li diras kelkajn gravajn kaj esencajn detalojn, iujn, kiujn li vidis, sed kiujn inerta observanto eble ne tiel facile ekvidas. Ne ĉiam estas grava kaj esenca tio, kio plej facile kaptas la atenton. La malgranda punkto en okulo de vizaĝo ne estas speciale elstara, sed ĝi estas grava; ĝi donas al la vizaĝo la plej gravan el

ĉio: vivon. Trovi la ĉefpunkton en situacio estas ĝuste la grava afero. Ni ĉiuj havas antaŭ ni la saman realaĵon, sed poetoj kaj pensuloj unualoke havas ĝustan rigardon por tiaj gravaj detaloj. Homo, kiun ni renkontas sur la vojo, estas por la pli multaj el ni nur homo "ĝenerale". Por poeto tiu estas aparta homo. Historia situacio estas por inerta observado nur ĝenerala situacio, sur kiun ni gluis certajn abstraktajn etiketojn kaj pro tio opinias, ke ni trapensis la aferon. Por historia esploristo kaj pensulo ĝi estas aparta situacio, kaj li klopodas trovi ĝuste tiujn specialtraĵojn, kiuj diferencigas ĝin de ĉiuj aliaj, kaj tiujn, kiujn ĝi havas komune kun aliaj.

Observi tiel, ke oni apartigas la esencan de la malgrava, verajn similaĵojn de ŝajnaj kaj verajn diferencojn de ŝajnaj — tiu arto estas fundamenta por la pensado. Fiŝo kaj baleno ekstere sufiĉe similas unu la alian, kaj la pli naiva pensado kunligas ilin en unu grupon. Povas ŝajni strange, ke baleno estas pli parenca al muso ol al ŝarko, tamen estas ja tiel. Ĉar pli bonaj observantoj trovis malpli okulfrapajn sed pli esencajn similaĵojn. Vi memoras la historion pri Newton kaj la falanta pomo — eble nur "historio", tamen instrua. Newton ne estis la unua, kiu vidis pomon fali, kaj ankaŭ ne la unua, kiu studis la movojn de la luno. Sed li vidis tion, kion ĉiuj aliaj ne vidis: ke ĉe tiuj du ŝajne tre diferencaj fenomenoj ekzistas esenca simileco. La trovo de tiuj esencaj kvankam ŝajne malproksimaj similecoj estas finfine fundamento por la tuta scienca pensado, por sistemigo, klasigo, starigo de ĝeneralaj leĝoj. Aliflanke multe da nekontura kaj malpreciza pensado venas el tio, ke oni pretervidas esencajn diferencojn. Estas facile labori per rapidaj ĝeneraligoj kaj supraĵaj analogioj. Kaj la rusa revolucio kaj la franca troviĝas sub la iom nepreciza koncepto "revolucio". Pro tio oni supozas, ke ili evoluas laŭ proksimume samaj "leĝoj". Sed Francujo en 1789 kaj Rusujo en 1917 tamen estas esence diferencaj fenomenoj. Oswald Spengler trovis certajn sufiĉe interesajn analogiojn inter diversaj kulturoj, kaj el tio li faras la konkludon, ke iliaj evolukurboj devas iri en sama maniero. Sed la

demando estas, ĉu li ne pretervidas la same esencajn diferencojn. Kulturo povas certamaniere simili al organismo, ekz. arbo, sed de tio estas granda paŝo al lia aserto, ke kulturo estas organismo.

Klaraj kaj precizaj konceptoj.

Se vi rigardas objektojn tra lorno, kiu ne estas bone ĝustigita por la okuloj, vi vidas ilin kun difuzaj, malprecizaj konturoj. En la flankoj de la vidkampo ĉio senkonturigas kvazaŭ en nebulo. Per tiaj senkonturaj figuroj kaj malprecizaj konceptoj ni ordinare laboras, kiam ni pensas pri iu demando. Ni ne bone klarigas al ni la situacion kaj ne klare limigas la koncepton. Ni pensas pli per vortoj ol per klaraj imagoj.

Pri kio vi pensas, kiam la vortoj "socialismo", "konservativa", "kapitalismo", "kolektivismo" glitas de via lango aŭ iras tra la kapo? Kion vi pensas, kiam vi diras, ke "la produktofortoj de iu socio decidus pri ĝia ideologia superkonstruaĵo"? Mi supozas, ke vi ion pensas, sed mi preskaŭ povas veti, ke estas io tre malpreciza, io, kion vi ne povas tute bone klarigi al vi mem. Ni tro multe uzas abstraktaĵojn, kiuj ne estas sufiĉe firme radiksigitaj en la realo.

"Kiu pensas abstrakte?" estas la titolo de disertaĵo de la fama filozofo Hegel, kiu mem emis uzi tre abstraktajn esprimojn. Hegel tamen volas montri, ke bona pensado ĉiam devas esti konkreta, bildovida, realoplena, kaj ke la senkontureco de la penso ofte dependas de tio, ke la konceptoj ne baziĝas sur sufiĉe da videblaj kaj klaraj imagoj. Kant diras la saman per fama frazo: "Konceptoj sen imagobildoj estas senenhavaj".

Memkompreneble ni devas ĉiam uzi abstraktaĵojn. Ili reprezentas grandegan ŝparadon de pensoenergio, kaj ni ne povas malhavi ilin. Ne estas necese, ke oni, uzante vortojn kiel "kapitalismo" aŭ "ideologia superkonstruaĵo" ĉiufoje klarigas al si, kion oni volas diri. Sed tio estas grava, ke oni scias, ke oni kiam ajn povas tion fari. Alie koncepto estas nur babilaĵo. Abstraktaĵoj havas en la pensovivo la saman taskon kiel papera mono en la ekonomia.

Tiu lasta estas ja praktika kaj dum pli komplikaj ekonomiaj cirkonstancoj absolute necesa. Sed tamen ĝi estas kaj restas nur papero sen valoro, se ĝin ne validigas realaj valoroj en formo de varoj. Same konceptoj: se oni ne povas kiam ajn ŝanĝi ilin en konkretajn imagobildojn, ili estas senvaloraj, povas fariĝi eĉ erarigaj. Oni kredas pensi, kiam oni laboras per ili, dum la cerbo efektive plenumas nur aŭtomate lernitajn artifikaĵojn.

Koncerne abstraktajn teoriojn ekzistas maniero decidi, ĉu oni komprenas ilin aŭ ne. Oni komprenas ilin, kiam oni povas apliki ilin konkrete. Aŭtoroj, kiuj vere volas, ke la legantoj komprenu ilin, kutimas ilustri abstraktajn teoriojn per konkretaj ekzemploj. Sed se ili ne faras tion, vi devas provi mem elpensi tiajn. Tio eble postulas iom da peno, kiu tamen estos bone kompensita, ĉar unu sola imagodona kaj klare perceptita konkreta ekzemplo ordinare diras pli ol multaj abstraktaj vortoj.

Abstraktaj konceptoj similas al moneroj ankaŭ tiel, ke ili iom post iom eluziĝas kaj perdas sian stampon. Jam kiam puŝataj en la merkaton la konceptoj ofte estas tro krude stampitaj, kaj iom post iom ili eluziĝas. Kiel oni batalis dum la oka kaj naŭa jardekoj de la pasinta jarcento pri la konceptoj "idealismo" kaj "realismo" en la literaturo! Kompreneble oni havis ĝeneralan kaj neprecizan imagon, ke ili ion signifas, sed preskaŭ neniu serioze provis esplori, kion ili efektive, klare kaj ekzakte signifas. Fine oni trovis, ke la tuta disputo estas sufiĉe senseca, ĉar ĝi faras artefaritajn limojn, kie limoj ne ekzistas en la realo. Oni povas esti kaj realisto kaj idealisto, kaj tiaj estis ja finfine ĉiuj grandaj verkistoj. Tiuj konceptoj ne estas kontentige klaraj por povi esti uzataj kiel elirpunkto por diskuto pri literaturaĵoj.

Same kiel konceptoj devas esti klaraj, konkretaj kaj kiel fundamenton havi rigarditan realon, ili devas esti ankaŭ precizaj. Kiel ni jam antaŭe montris, kaŝas sin en la vortoj multe neklara kaj dubesenca. Pli subtilan pensadon karakterizas pli granda nuancigo; por ĝi ne sufiĉas la ordinaraĵoj inter la konceptoj; foje ĝi nuligas ilin, ĉar ĝi

trovas ilin erarigaj kaj malprecizaj, foje ĝi faras novajn. Oni senfine pensis pri la valoro de certaj homaj kvalitoj, ekz. humilo kaj fiero. Kelkaj laŭdis humilon kiel la unuan inter la virtoj, dum aliaj egaligis ĝin kun malplivaloro, flataĉo, servemaĉo. Kelkaj laŭdis fieron kiel nobelan kaj superan virton, dum aliaj rigardis ĝin morale kondamninda. Tia kontraŭeco kompreneble povas dependi de efektiva kontraŭeco. Sed pli ofte ĝi dependas de tio, ke oni uzas konceptojn ne kontentige precizajn. Ekzistas multaj specoj de humilo, kaj inter alie troviĝas unu, kiu tute ne estas kontraŭaĵo de fiero, sed kiu eĉ postulas certan fieron, certan memestimon. Fröding* estas samtempe tre humila kaj tre fiera, kaj oni povas demandi, ĉu tio finfine ne validas por ĉiuj pli subtilaj kaj noblaj homoj. Estas klare, ke oni devas liberigi sin de rutinaĉaj konceptoj kaj fari novajn limojn, se oni kun espero pri sukceso volas pensi pri tiuj demandoj. La limo ne iras inter humilo kaj fiero kiel du nekunigeblaj kontraŭaĵoj sed, unuflanke, inter nobla, trankvila sento de propraj limoj kunigita kun nobla memestimo kaj, aliflanke, vulgara, flataĉa kaj mizeranima humilo kunigita kun stulta fiero.

Estas kaŭzo pli ofte pripensi, ĉu estas konservindaj tiuj konceptoj kaj pensaj kontraŭecoj, kiujn ni uzas senpense kaj pro malnova kutimo. Nia pensado fariĝus pli freŝa, klara kaj vigla, se ni jen kaj jen decide forbalas la polvon de vorta saĝo. Granda parto de originaleco kaj novkreado en la mondo de pensado dependas de tia faro. En la komenco de la nova tempo okazis tia ĝenerala purigo en la pensa vivo, kaj amaso da vortopolvo estis forigata. Sed ĉiam amasiĝas nova aranea fadenaĵo, kaj de tempo al tempo oni devas denove purigi — kaj en la pensa vivo de la popoloj kaj en la kapoj de la individuoj. Kiu prenis la materialon por siaj pensoj rekte el la naturo kaj la propra sperto, tiu ofte pensas pli saĝe kaj klare ol tiu, kiu ĉerpis ĝin ĉefe el libroj. Tio dependas tute simple de tio, ke ĉe la unua la animo ne estas kovrita de amaso da vortopolvo.

*) Granda sveda poeto.

Demandi en ĝusta maniero.

Pensi signifas, kiel dirite, pro certa situacio reagi en la ĝusta maniero. Por senpensulo situacio estas muta kaj seninteresa. Pensanto kaptas la demandojn, kiujn ĝi direktas al ni.

Estas nepra kondiĉo, ke oni faru la ĝustajn demandojn, se oni volas ricevi la ĝustajn respondojn. Sokrato opiniis, ke tio estas eĉ la sole necesa. Lia stranga opinio estis, ke homoj ĉiam respondas en la ĝusta maniero, se oni nur demandas en ĝusta maniero. Por solvi problemon estas necesa nur tio, ke ni ĝuste konstruas ĝin; la solvon ni verdire portas en ni mem, ni devas nur elogi ĝin, "rememorigi" ĝin al ni. Tiu opinio povas ŝajni troigita, sed ĉiuj majstroj de edukado konfirmis, ke ĉiuokaze estas multe da vero en ĝi. Ankaŭ la historio de filozofio kaj scienco konfirmas ĝin. La gajno de filozofia pensado dum du kaj duona jar-miloj, en kiu partoprenis multaj el la plej bonaj cerboj de la homaro, estas esence tio, ke oni lernis konstrui la grandajn fundamentajn demandojn de la vivo pli ĝuste, pli precize kaj klare. Same estas pri la progreso en naturscienco kaj en historiaj sciencoj.

Kiam vi provas solvi problemon, vi unue kiel eble plej bone pripensu, pri kio efektive temas. Turnu la demandon en diversaj manieroj kaj serĉu novajn formuladojn, ĝis vi trovos tiun, kiun vi kredos plej preciza kaj fruktodona. Provu trovi kiel eble plej konkretan formuladon; restu kiel eble plej proksime al la solida tera realo kaj estu singarda pri grandiozaj kaj subtilaj abstraktaĵoj. Prefere serĉu rilaton kun aktualaj cirkonstancoj; estas pli facile pensi pri demando, se ni komprenas, ke ĝi iel "koncernas" nin.

Ĝusta sekvo de la demandoj.

Ĉiu granda demando entenas multe da malpli grandaj. Ĉiu cirkonstanco, kiun la penso devas klarigi, estas komplekso de multaj demandoj. Por ke regu ordo en la tuto, oni devas trakti tiujn laŭvice. Ordinare oni provas solvi problemon tiel, ke oni rekte atakas la ĉefdemandon kaj poste implikas la aferon pli kaj pli. Tio similas al la homo

en la fermita ĉambro, kiun ni ĵus imagis, kaj kiu kuris tien kaj reen kaj fine nur puŝis sian kapon kontraŭ la muron.

La subtila kaj ekzercita pensado kontraŭe tuŝas la aferojn delikate kaj lerte. Kiam ĝi superrigardis la situacion kaj ekvidis la ĉefdemandon, ĝi provas dividi tiun en diversajn demandojn kaj trakti tiujn laŭvice. Ordinare estas prudente komenci per la pli facilaj kaj poste iri al la pli malfacilaj.

Inerta kaj difuza pensado ofte venas de tio, ke oni ne sufiĉe apartigas diversajn demandojn. La populara pensado ofte intermiksas du gravajn demandogrupojn, kaj el tio venas multe da komprena konfuzo; tiuj estas demandoj pri la origino de io kaj pri la valoro aŭ valido de io. Religia psikologio kaj religia historio montras ekz., ke la religiaj imagomondoĵoj havas sian originon en parte tre primitivaj instinktaj kompleksoj en la profundo de la mensa vivo — sekve, aldonas la populara pensado, religio estas entute nur primitiva superstiĉo el la infanaĝo de la homaro. Tio estas kvazaŭ ni dirus: tiuj atomoj, kiuj formas floron, venas el tero kaj aero — sekve floro estas nur amasiĝo de tiaj atomoj, kaj sekve ĝi ne valoras pli ol ili. La penseraro estas facile videbla: konstato pri faktoj neniam entenas valorprijugon. Ankaŭ sciencaj tezoj havas tre primitivan originon, sed la demando pri ilia vero estas tute alia ol tiu pri ilia historia origino. En la juro oni de malnova tempo apartigas faktodemandojn de valordemandoj. Tium precizigon ni devus enkonduki en la pensadon. La demando: kiel estiĝis io? kaj: kio bona estas en ĝi? estas du sufiĉe diversaj aferoj, kiujn oni devas ne intermiksi.

Plano estas necesa por pensado.

Komprenoble oni povas hazarde atingi bonajn rezultojn, sed tio estas malofta escepto. La pli multaj entreprenoj sukcesas nur per sistema, laŭplana procedo. Solvado de problemo ne malplej postulas tion. Ju pli komplika tiu estas, ju pli da pensoagoj ĝi postulas, des pli necese estas, ke oni faras bonan planon. Ne ĉiam estas facile teni tian

en la kapo, kaj en pli komplikaj okazoj estas plej bone fiksi ĝin sur paperon. Per tio vi ekzercas vin dumaniere: en skribado, ĉar skriba esprimado postulas ordon kaj planon, komponadon, kaj en pensado, ĉar tiu, kiu lernas ordigi la pensojn, lernas pensi celkonscie.

Komprenoble dependas de la naturo de la problemo en ĉiu aparta kazo, kia aspektu la atakplano, kiun oni faras, antaŭ ol oni atakas problemon. La ĝeneralan pason oni tamen povas skizi jene:

1. Provu kiel eble plej klare kaj precize determini, kion celas la ĉefa demando.
2. Kolektu el propra sperto kaj el libroj ĉiujn faktojn, kiujn vi opinias necesaj por solvi la demandon.
3. Kolektinte la materialon klarigu al vi, kion vi opinias esti decidiga kaj grava en tiu materialo.
4. Dividu la ĉefdemandon en partodemandojn kaj pripensu, en kia sekvo vi devas trakti ilin. Antaŭ ol respondi al la demando A, vi devas respondi al la demando B ktp.

Koncentriĝo kaj ripozo.

La plej malfacila afero, kiam oni volas pensi, estas koncentrigi la pensojn, teni ilin kolektitaj. Ĉiam ili volas iri siajn proprajn vojojn kaj flugi for, kaj eĉ se ni havas ĉirkaŭ ni la trankvilon, kiu estas necesa por pensado, ĝenas nin ekstertemaj pensokunligoj. Multe estus gajnita, se oni povus indiki iun ĝeneralan metodon por lerni la arton de koncentriĝo, sed mi timas, ke tia ne estas trovebla. Certe oni tamen povas multe atingi per memdisciplino kaj energia ekzerco. Oni iom post iom lernas forbari aliajn pensojn kaj koncentrigi sin pri la koncerma problemo. Unuopaj homoj multe atingis en tiu arto kaj ne nur kvietaj pensuloj sed ankaŭ homoj de la praktika vivo, de kiuj miloj da aferoj postulas atenton. Oni rakontas pri Napoleono, ke li per sistema ekzerco atingis eksterordinaran kapablon okupiĝi pri la momente traktataj aferoj, sed en sekvanta momento li povis same rapide koncentrigi sin pri

alia temo. Laŭ propra diro li havis en sia menso "tirkestojn", kiujn li laŭplaĉe povis malfermi kaj fermi. Sed bedaŭrinde ne troviĝas iu grandvojo al la malfacila arto de koncentriĝo. Intereso ĉiam multe helpas, kaj parto de tiu arto estas pligrandigi la intereson. Ĝuste pro tio estas bone, kiel antaŭe dirite, serĉi kiel eble plej aktualajn temojn. Cetero oni ofte rimarkas, ke intereso por afero ofte venas dum laboro pri ĝi. Troviĝas nenio "seninteresa" en tiu ĉi riĉa kaj multflanka ekzisto; dependas nur de ni mem, se ni trovas ĝin seninteresa. Dependas de tio, ke ni ankoraŭ ne malkovris la grandan komunecon, kiu finfine kunligas ĉiujn aferojn kaj demandojn en unu tuton, la plej malgrandajn same kiel la plej grandajn.

Oni tamen ne povas ĉiam devigi sin al koncentriĝo. Estas malbona ekonomio daŭrigi laboron — precipe penso-laboron — trans la limon de laco. Kiam oni sentas, ke la pensoj volas flugi for, estas plej bone fini. La pensolaboro tamen ne ĉesas. Ĉar kiam vi ripozas, faras promenon aŭ legas libron, troviĝas profunde en la interno io, kio laboras, kaj tion la psikologoj nomas "la subkonscio". Ĝi laboras eĉ dum la dormo, eble tiam plej mirinde. Vespere vi enlitiĝas elĉerpita pro cerbumado pri demando, kiu ŝajnas al vi tiel konfuza, ke vi tute malesperas pri solvo. Sed la sekvantan matenon vi ellitiĝas, kun klara cerbo kaj klara rigardo — kaj la ĝusta solvo kvazaŭ per si mem aperas antaŭ vi. La subkonscio laboris, dum vi dormis, ĝi ordigis la fadenojn de la konfuza implikaĵo kaj faris la ĝustajn kombinojn. Kaj kvankam ni ne povas penetri ĝian misteran laboron, ĝi akurate anoncas, kiam tiu laboro estas preta, sendante la rezulton supren en la klaran lumon de la konscio. Tiel mirinde nia mensa vivo estas konstruita. Estas ĝia sciigo, kiun poetoj kaj pensuloj jam de malnova tempo nomas "inspiro", ĉar tiuj pensoj, maturiĝintaj en la profundo de la subkonscio, ŝajnis kvazaŭ de fremdaj estaĵoj enspirataj en la animon.

Generale oni ricevas nenion senpage kaj tute ne la bonajn pensojn. Sed povas okazi, ke "la inspiro" fine venas kiel rekompenco, kiam oni longe kaj vane laboris pri iu

afero. Tio povas esti konsolo por tiuj, kiuj senesperigas dum la pensa laboro. Se vi faris ĉion, kion vi povas, tiam lasu la tutan aferon kaj kredis, ke la subkonscio finfaros ĝin. Eble venos iun tagon la ĝusta penso kiel "inspiro".

Tradukis S. E n g h o l m.

La angla karaktero De K. R. C. STURMER

Unu el la malbonaj trajtoj de la esperantismo estas la emo malatenti la profundajn diferencojn, historiajn kaj aktualajn, inter la popoloj. En kongresoj francoj renkontas svedojn, polojn renkontas britojn. Sed el tiaj renkontoj unu nenion lernas pri la karakteroj kaj medioj de la alia: ili estas kontentaj saluti, menpremi kaj babili en ia artefarita nebulo rozkolora.

En la realo la ccoj de diversaj nacioj kaj kulturoj estas tre gravaj kaj studindaj; sed ili ne estas studeblaj en amikecaj kongresoj. Oni ne komprenas pli bone la francajn karakteron kaj kulturon post feliĉa kaj multkunvena libertempo en Parizo.

La angla karaktero havas, miakrede, plurajn proprajn ecojn, el kiuj mi volas iom skribi pri kvar. Ili estas: la neordinara amo al hejmbestoj, la humuro*, la emo akcepti kompromisojn kaj la puritana moralemo.

Jen iom pri hejmbestoj, ankaŭ agrikulturaj bestoj. Tiuj lastaj certe estas malpli kruele traktataj ol en multaj aliaj landoj. Kaj rilate al hejmbestoj oni estas ofte eĉ sentimentalaj, tro. En tempo, kiam milionoj duonmilsatis pro manko de laboro, oni testamentis grandajn sumojn por rifuĝejoj al senhejmaj katoj kaj hundoj. Sed tiu trajto havas agrablan flankon.

Mi memoras, ke pli ol unu recenzanto de mia traduko

*) Humuro = gajhumoro, ŝerchumoro.

"Princino de Marĉo" plendis pro tio, ke mi konstante aludis al la amata hundego per la vorto "li" anstataŭ "ĝi". Sed mi ne pentas. Mi tradukis verkon esence britan (kaj usonan) laŭ karaktero, kaj mi certe ne konsentus perfidiĝian karakteron uzante "ĝi" por amata besto. Ĉu esperanto ne celas al internacia kompreno?

Pri la emo de angloj sinteni humure kaj ŝerce en la plej danĝeraj situacioj ne necesas multe skribi. La trajto estas tutmonde konata. La humuro baziĝas funde sur ia kompreno pri la proporcioj de aferoj, pri la valoro de pluraj flankoj en iu situacio. Iel oni saviĝas el tre gravaj kaj danĝeraj situacioj de la vivo. Tion oni vidis ofte en la nuna milito.

La emo akcepti kompromisojn montriĝis tre ofte dum la angla historio. Ĝuste en tempo, kiam ŝajne komenciĝos ĝismorta batalo inter la eklezianoj kaj la kontraŭklerikalaj pri religia eduko en la lernejoj, batalo, kiu malhelpus ĉian evoluon de la lerneja sistemo, ĝuste en tiu momento oni trovas ian kompromison akceptatan de ambaŭ partioj. En lando, kie regas pli logika menso, ekzemple Francujo, tia batalo daŭras eterne kaj malbone influas al la tuta eduka sistemo.

Ia toleremo estas miksitaj en la afero. Oni ofte atentigis, ke unika estas la placo apud la londona parko Hyde, kie de dudek estradoj, unu apud la alia, oni arde propagandas la ateismon kaj la katolikan eklezion, la savarmon kaj la spiritismon, esperanton kaj pli facilan ekscedziĝon, komunismon kaj teozofion. En kiom da aliaj ĉefurboj de la mondo oni povus sen tumultoj tiel paroli al homamasoj?

Pri la moralemo mi memoras ion, kio rilatas al la karaktero de Oscar Wilde, kies teatraĵojn oni lastatempe kun elstara sukceso rec prezentis en Londono. Wilde estis aristokrato, el angla familio longe loĝinta en Irlando. En 1895, meze de tre sukcesa kariero, li ricevis severan enkarcerigon dujaran pro iaj interviraĵoj, kiuj ne estas puneblaj laŭ la leĝoj de la pli multaj landoj, ekzemple la latinaj.

Estas historia fakto, ke la polico ne volis procesi kontraŭ Wilde, ke la altaj instancoj estus preferintaj eviti tian skandalon, ke oni lasis al li liberecon de pluraj tagoj kaj esperis, ke li dum tiu tempo fuĝos al Francujo. Sed Wilde, kiu perfekte posedis la francan lingvon kaj estis tute hejme en la franca medio, preferis resti en Anglujo kaj akceptis sian sorton de la angla leĝo. Malgraŭ sia neangla estetikismo, sia kosmopolitismo, sia mokemo por la angla burĝa karaktero, li pro ia profunde angla moralemo estis devigata resti kaj suferi. Veninte el sia suferego li verkis la libron "De Profundis", en kiu li montris sian koron. Nu, unu el la plej anglecaj instrusentencoj por junuloj en Anglujo diktas, ke "oni ne portu la koron sur la maniko". Do, Wilde agis neangle. Sed la verko certe montras tre interesan lukton en Wilde, en kiu lia artista karaktero strange miksiĝas kun la puritana moralemo de normala anglo. —

Mi ripetas, la esperantismo havas malbonajn ecojn, kaj la emo kovri naciajn diferencojn per tavolo de siropa parolo pri frateco kaj homarismo certe estas unu el la elsarkindaj aferoj de nia movado. Ni vizitu kongresojn kaj alilandajn sampsikulojn, se tio faras al ni plezuron kaj bonon. Sed la anglo Chesterton prave diris: "Kristo amis ne la homaron sed la homojn". Kaj la esperantisto studu ne la homariston sed la historion kaj la literaturon de la homoj, se li deziras internacian komprenon.

La supra artikolo eble vekos opozicion ĉe kelkaj legantoj. Ĝi tre bone taŭgas kiel enkonduko por diskutado, kaj mi volonte aperigos kontribuojn al tia eventuala debato. Kontribuoj estu konkluzaj kaj prefere traktu esencajn aferojn.

Persone mi volas aldoni, ke Sturmer kompreneble pravas en tio, ke diferencoj ekzistas, ke ni devas atenti pri ili kaj provu kompreni ilin. Tamen mi opinias, ke ni devas ankoraŭ pli multe atenti pri tiuj aferoj, kiuj estas komunaj por la diversaj popoloj, kaj kiuj tial povos kunligi ilin. Kaj diferencoj ne nepre estas malhelpo por interkompreno kaj komuna laboro.

Rilate al la esperantista observopovo mi trovis, ke multe da esperantistoj, precipe el malgrandaj popoloj, tre bone kaj objektivaj prijuĝas aliajn popolojn, kaj kritike kaj aprobe.

S. Engholm.

La kristnaskotagon 1943.

Per kiuj rimedoj la nuntempa mondo liberigu sin el la minaco de sklaveco?

La minaco estas nun eĉ pli granda ol iam antaŭe. Kolo-saj fortoj tutmondaj estas uzataj kontraŭ libero. La rimedoj de la sklavigantoj estas samaj kiel antaŭe, ili estas nur pli fortaj kaj pli diversaj. Ankaŭ la rezulto estas pli terura ol antaŭe.

Iam paganaj gepatroj libervole — tamen pro instigo de paganaj pastroj — oferis siajn infanojn al Moloko. En la mezepoko oni bruligis senkulpajn sed neŝatatajn homojn, ekzemple herezulojn, kvazaŭ ili estus krimuloj. — Nuntempe oni devigas la gepatrojn oferi siajn filojn al Moloko, ankaŭ kun helpo de pastroj "kristanaj". Oni ja postulas juron eĉ de tiuj junuloj, kiuj nur devige aliĝas al milit-armeoj. La gepatroj ankaŭ ne povas liberigi siajn filojn — kaj apenaŭ la filinojn — el la faŭko de Moloko.

La homa libero estas nun tre malgranda. Tiel elementa libero kiel rajto vivi sian vivon ĝis natura fino estas forprenita de la junuloj; ilian vivon oni ja forprenas perforte sur la batalejoj. Tre multaj gepatroj en kelkaj landoj devas kun teruro vidi siajn filojn en malsanulejoj, disŝiritajn de grenadoj. Multaj el ili tamen povos vivi jarojn, eĉ jardekojn, se la koro estas sana.

Hodiaŭ estas la kristnaska tago en 1943. Do preskaŭ 2.000 jaroj pasis post la instruo de la Princo de paco. Kaj tamen kanonoj kaj flugbomboj tondras pli terure ol iam antaŭe. La popoloj, la "kristanaj" popoloj! denove vivas en densa mallumo. La demonoj estas liberigitaj grand-skale.

Kion ni do devas fari? Ni devas ekbatali kontraŭ ili, same kiel batalis niaj praavoj. Ni ja havas la samajn batalilojn: kristanisman, universalan amon. Ilin ni uzu, pli energie ol iam antaŭe. La amo ja estas pli forta ol la mal-

amo. Amo iru de ni mem al la plej proksimaj fratoj kaj ĝis la tuta homaro, sen konsidero al raso, religioj ktp.

La lumon de amo ni ja povas senkoste disvastigi ĉirkaŭ ni. Kaj tion farante ni mem fariĝos pli bonaj. Ni ja havas pli multajn kaj pli bonajn rimedojn, ol oni antaŭe havis, por batali kontraŭ nuntempaj paganeco, kruelo, stulto. Esperanto estas tia nova armilo kontraŭ tiu malamo, kiu plejparte estas kaŭzo de la nuna aĉa situacio de la "kristanaro". Pere de esperanto ni povas atingi eĉ la plej malproksiman fraton sur la terglobo.

Ni devas unue mem lerni nian karan lingvon perfekte. Poste ni devas ĝin instrui al aliaj homoj kun bona volo kaj tiel iom post iom teksti ĉirkaŭ la terglobo reton de frateco kaj amo. Nur amo povas savi la homaron. Per amo ni povas venki eĉ la plej kruelan krimulon. Perforto ĉiam vekas kontraŭperforton, tion ni devas fine lerni. Tro longe la estroj de la popoloj fidis al bataliloj, al "armita paco". La popoloj devas ĵeti la jugon de militarismo kaj levi unu kontraŭ la alia ne batalilojn sed amon.

Ĉiu popolo bezonas helpon de la aliaj, neniu bezonas malhelpon.

Knabo kaj birdo

De STELLAN ENGHOLM

Dekjara ĉasisto malrapide kaj ŝtelpaŝe movis sin sur folikovrita tero inter nudaj arbustoj kaj arbetoj. La arko de lia sagpafilo estis streĉita, kaj sago kuŝis preta en la sulko.

Aro da marĉoparuoj salte flugis inter la arboj kaj vigle pepadis. Ili ne estis timemaj, kaj ili malmulte atentis pri la ĉasanta Jano. Kiam li venis proksime al ili kaj liaj sagoj minacis ilin, ili flugis malgrandan distancon sed poste restis kaj denove pepadis kiel antaŭe.

Kiam li staris celante, liaj rigardoj sopire kaj karese ri-

gardis la elektitan birdeton. Estas mirinde pafi sagojn al-ten ĝis la suproj de la plej altaj arboj aŭ tre malproksimen laŭ la tero, sed ankoraŭ pli mirinde estus tiel kapti beston, kiu troviĝas malproksime de oni.

Sed Jano ne havis sukceson. Aŭ la birdo flugis for en la lasta momento, aŭ la sago iris flanken. Li jam malesperis kaj komencis pensi pri hejmeniro, kiam li ekvidis flave-verdan birdeton, kiu trankvile ĉirkaŭiris sur la tero dek metrojn de li. Estis emberizo. Li bone konis ĝin same kiel la aliajn ordinarajn birdetojn.

Li longe rigardis ĝin sen levi la pafilon. Verŝajne estas tro malfacile pafi tiel precize. Sed kiam la birdo same trankvile restis, Jano tamen metis la pafilon al la vango, celis tre zorge kaj ekpafis.

En la sama momento ekflugis la birdeto, sed la sago atingis ĝin en ĝia flugo, kaj ĝi falis teren.

Jano restis senmova dum kelkaj momentoj. Jen fine li trafis! Sed kontenta li ne estis. Estis ja bonŝanco. Se la birdo estus restinta, la sago ne estus trafinta.

Li kuris antaŭen, ekĝenuis apud la birdo kaj rigardis ĝin sed ne tuŝis ĝin. La flugiloj kaj la korpo iomete moviĝis, sed ĝi restis kuŝanta.

Jano embarasiĝis. Kion fari pri la birdo? Oni ja ne povas manĝi ĝin. Momente li pensis pri donaco al la kato, sed ial tiu ideo ne plaĉis al li.

Fine li prenis la birdon kaj esploris ĝin. La sago ne fiksiĝis en ĝi, sed malantaŭ la kolo estis malgranda vundo sub la dorsa lanugo. Eble ĝi tamen reviviĝos kaj ne mortos.

Li tre singarde tenis ĝin en la kavoj de siaj manoj kaj li ekhavis strangan senton, kiam li vidis, kiel ĝi tremspiras kaj kiel ĝia koro batas. Li ekpensis, ke la birdo eble ankaŭ timas lin, kaj li tre delikate metis ĝin sur la teron kaj ek-sidis apud ĝi.

Iom post iom la birdo rekonsciiĝis. Ĝi skuis la kapon kaj tute malfermis la okulojn, kvazaŭ ĝi vekigus el sonĝo, kaj ĝi komencis movi la flugilojn. Fine ĝi provis flugi, sed ĝi ne sukcesis. Nur kelkajn decimetrojn ĝi duone flugis, duone saltis, kaj poste ĝi denove estis sur la tero.

Kiam Jano vidis, ke ĝiaj klopodoj restas vanaj, li denove prenis ĝin kaj iris hejmen kun ĝi. Ne estis longa vojo, ĉar li troviĝis tuj ekster la barilo de la bieneto, kie estis lia hejmo.

— Panjo, li diris kaj hezite montris al ŝi la birdeton, mi volas flegi tiun ĉi birdeton. Mi pafis sur ĝin, sed ĝi ne mortis. Se mi bone flegos ĝin, ĝi eble resaniĝos.

La patrino mallaŭdis lin pro lia faro, sed ŝi ne volis, ke li havu la birdon en la domo. Ŝi diris, ke li aŭ reportu ĝin en la arbaron aŭ mortbatu ĝin. Sed Jano ne cedis. Se li reportus ĝin, li diris, prenis ĝin vulpo aŭ kato, kaj mortigi li nepre ne volas. Se li flegos ĝin, ĝi certe resaniĝos. Fine ŝi konsentis al lia peto.

En la hejmo de Jano estis nur kuirejo kaj unu alia ĉambro. Li aranĝis ripozlokon por la birdo en angulo de la ĉambro kaj metis apud ĝin grenerojn kaj subtason kun akvo. Poste li forlasis la ĉambron, por ke ĝi povu trankvile ripozi, kaj li instruis al la patrino, ke la pordo nepre estu fermita, por ke la kato ne povu eniri.

Jano faris siajn lernotaskojn kaj iom helpis la patrinon, sed jen kaj jen li tre singarde malfermis la pordon kaj rigardis la birdon. Ĝi sidis senmova en la sama loko kaj ŝajnis dormi.

Kiam la patro venis hejmen en la vespero, Jano rakontis la aferon ankaŭ al li. Li diris, ke estas plej bone mortbati ĝin, ĉar verŝajne ĝi estas tro difektita. Ĉiuokaze li ne volas havi ĝin en la ĉambro dum la nokto.

La patro iris en la ĉambron por rigardi ĝin, sed la birdo estis malaperinta. Jano zorge serĉis, sed nek li nek la gepatroj povis trovi ĝin. Ĝi devus troviĝi en la ĉambro, ĉar la patrino estis absolute certa, ke la pordo estis fermita la tutan tempon, kiam Jano estis ekstere, kaj la ceteran tempon Jano mem atentis pri tio. Tamen ĝi ne troviĝis tie.

La gepatroj ne plu atentis pri la la birdo, kaj ili ĉiuj enlitiĝis. Jano estis konfuzita pro la malapero kaj aspektis malgaja. Al la gepatroj li nenion diris, sed kiam li kuŝis en sia lito, li silente preĝis al Dio, ke li helpu la birdon, kie ajn ĝi troviĝas, kaj faru ĝin denove sana.

Guste kiam Jano vekigis la sekvantan matenon, li aŭdis klartonan pepeton kaj ekvidis la birdeton, kiu sidis en sunstrio sur la planko. Jano tuj iris el la lito kaj proksimiĝis al ĝi. Ĝi ŝajnis sufiĉe vigla kaj provis flugi for, sed tion ĝi ne povis. Jano prenis ĝin kaj ekzamenis ĝin sed ne eltrovis, kiel li povas helpi. Kiam li rigardis en la brilajn okulojn de la malgranda kapo, kaptis lin stranga sento. Estas ja malgranda estaĵo, kiu vivas kiel li mem. Ĝi estas kvazaŭ malgranda kamarado, kiun li devus helpi. Sed li ne povas helpi. Kaj la malgranda kamarado ne povas paroli. Ĝi nur rigardas per siaj brilaj okuloj kaj maltrankvile movas sin.

Jano devis iri al la lernejo, kaj li petis la patrinon zorgi por la birdo dum lia foresto. Kiam li posttagmeze revenis, ĝi denove estis malaperinta. Por voki ĝin li imitis la pepetojn, kiujn ĝi faris en la mateno, kaj tuj venis respondo, kaj li ankaŭ ekvidis ĝin. Iel ĝi estis sukcesinta flugi supren al kelkaj florpotoj, kiuj staris sur benko. Tie ĝi sidis inter la floroj, kaj ĝi estis manĝinta la burĝonojn de ili.

Jano pasigis grandan parton de la posttagmezo kun la birdeto. Jen ĝi ĉirkaŭpaŝetis sur la planko, jen provis re-flugi al la floroj, jen sidis senmova kaj malrapide palpebrumis kiel laca infaneto.

En la krepusko ĝi malaperis same mistere kiel en la antaŭa vespero, sed en la mateno ĝi reaperis. Tiam Jano estis la unua, kiu pepetis, kaj la birdo respondis kaj elvenis el sia kaŝejo.

Pasis ankaŭ tiu tago. La birdo iom movis sin kiel antaŭe, sed ĝi ne povis flugi, kaj ĝi ne manĝis de la greneroj. Tio maltrankviligis Janon. Sed eble ĝi tamen povos resaniĝi, iom post iom. Kiel bonaj amikoj ili estos! Paroli unu kun la alia ili ne povos, sed ankaŭ pepado estas kvazaŭ parolo.

La sekvantan matenon Jano vekigis tre frue, ĝuste kiam la patro foriris. La sunstrio jam kuŝis varme flava sur la planko, sed la birdo ankoraŭ ne venis el sia kaŝejo. Jano vokis per mola pepo, sed respondo ne venis. Ankoraŭfoje li vokis, sed lia voĉo restis sola.

Li sentis strangan premon en la brusto, kiam li iris el la lito por serĉi la birdon. Preskaŭ tuj li trovis ĝin. Ĝi ku-

ŝis en malhela angulo inter la komodo kaj la muro, kun la kapo duone kaŝita sub la flugilo.

Jano metis ĝin en la kavon de la maldekstra mano kaj tuŝis ĝin per la fingroj de la alia. Ĝi estis tute senmova, la korpo ne estis varma, la duonfermitaj okuloj aspektis strange, ili ne vidis plu, ili ne vivis. La premo en la brusto kunpremis sufoke ankaŭ lian gorĝon, li ektemis, kaj silente ruliĝis larmoj el liaj okuloj.

Neniam Jano sentis sin tiel senpova. Kie estas nun la malgranda birdo, tio malgranda, kio vivis kaj parolis per klartona pepado?

Jano rapide vestis sin, kaj kun la birdo en la mano li iris en la kuirejon.

— Panjo, la birdo mortis, li diris.

— Estas plej bone, nun ĝi ne suferas plu, diris la patrino.

— Kaj estas mi, estas mi, kiu mortigis ĝin, li aldonis tremvoĉe.

Li eliris. Apud la lignejo li prenis malgrandan lignopecon. Poste li iris al la arbaro, tien, kie li ĉasis antaŭ kelkaj tagoj.

Kiam li venis al la loko, kie li pafis la birdon, li per la ŝtipeto fosis truon en la tero. La fundon de la truo li kovris per musko, kaj sur la muskon li metis la birdeton, kaj ĝian kapon li kaŝis sub la flugilo. La suno lumis sur ĝin, kaj ĉirkaŭe en la arbaro sonis la matena pepado de la birdoj.

Jano interplektis la fingrojn kaj profunde klinis la kapon.

— Pardonu min! li flustris.

Poste li metis muskon ankaŭ sur la birdeton kaj kovris ĉion per la elfosita tero.

Kiam tio estis preta, li restis surgenuie antaŭ la birdotombo. Li persiste rigardis ĝin, kaj liaj lipoj tremis. Subite li ĵetis sin sur la teron kaj kaŝis la vizaĝon per la manoj. Lia tuta korpo tremis, kaj li forte ekploris.

Mortis Gunnar Furhammar

Pastro Gunnar Furhammar, kiu per "Juda amiko" kontribuis al nro 2/1943 de M.R., mortis la 5an de marto, 48jara.

Furhammar estis fervora esperantisto kaj praktika uzanto de la lingvo. Laŭ la memorvortoj en Svenska Esperanto-Tidningen li korespondis kun pli ol 60 landoj. Ne estis ordinara porplezura korespondado. Li volis konatiĝi kun la esencaj aferoj ĉe la homoj, kaj li ĉiam komencis sian korespondon per kelkaj simplaj sed gravaj kaj tre personaj demandoj pri vivkonceptoj kaj opinioj. El tio sekvis preskaŭ ĉiam daŭra kaj valora diskutado kaj interŝanĝo de pensoj, ordinare dum multaj jaroj. Ne nur leterojn li sendis al siaj amikoj en aliaj landoj. Kiam li eksciis pri malfacilaj cirkonstancoj li ankaŭ laŭpove helpis.

Malgranda parto de lia korespondado — kun katolika pastro — estas eldonita libroforme en la sveda lingvo. Certe ankaŭ aliaj partoj de lia korespondo estas eldonindaj.

En esperanto li eldonis la libreton "La religiaj cirkonstancoj en Svedujo" kaj libron pri Stanley Jones, "La homo kiun milionoj aŭskultas".

Post la fondiĝo de la sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia li estis ĝia prezidanto ĝis sia morto.

Bona, simpla kaj sinceranima homo estis Gunnar Furhammar. Per pensoj, vortoj kaj agoj li mem realigis kaj instruis al aliaj tiun vivmanieron kaj spiritostaton, kiujn instruis Jesuo en sia monta prediko.

Gunnar Furhammar pasis for el nia rondo, rondo kiu por li pli konkrete ol por la pli multaj el ni vere estis tutmonda amika rondo. Ni memoru lin, kaj ni daŭrigu la laboron!

Stellan Engholm.

Nokto

Tra nigra nokto viaj torĉoj, fratoj,
salute brilas. Vi esperon donas
kaj vojon montras al erarvagantoj.

*

Survoje multaj torĉoj estingiĝis
dum la konkuro inter la portantoj,
kaj nokto ĉirkaŭvolvis nian aron.

Kaj ni akuzis unu la alian,
ni diris krudajn vortojn kaj kolere
ni luktis unu kontraŭ la alia.

Nin kaptis fine kortremiga timo,
minacis nin fantomoj en la nokto,
kaj al ni mem ni mem fantomoj ŝajnis.

*

Gvidlumoj estu viaj torĉoj, fratoj,
al torĉo torĉo donu novan fajron,
ĝis ni la vojon povos bone vidi.

Stellan Engholm

Literaturo

Prof. Agostinho da Silva: LA ARANEOJ.
Eld.: Manuel de Freitas, Porto, Portugalujo.
Prezo por Svedujo 0.50 kr. (inkl. sendkoston).

La araneoj estas popularscienca verketo (ampleksas 20 negrandajn tekstopuĝojn) tradukita el la portugala. Ĝi apartenas al serio da "Kulturinformaj tekstoj por la junularo", verkita de la sama aŭtoro. Laŭ anonco sur la kovrilo estas eldonita en esperanto ses tiaj volumetoj. Peranto por Svedujo estas Einar Adamson, Värmlandsgat. 18, Göteborg.

La libreto donas diversajn elementajn, interesajn informojn pri araneoj kaj ilia vivo. La enhavo ne estas ampleksa eĉ kiel skizo, sed por laika ŝatanto de naturscienco, kiu ne studis tiun fakon, ĝi povas esti bona komenca informilo.

Diversaj gramatikaj eraroj troviĝas. Vortelekto estas kelkloke ne-bona. Konstruo de vortoj, esprimoj kaj frazoj estas ofte nelerta.

Korektoj en nro 1/1944: p. 5, lin. 1 anst. popola — popolo, p. 10 lin. 5 kaj p. 13 lin. 14 anst. ĝuste — ĵus, p. 13 lin. 10 anst. Aroditās — Afroditās, p. 14 lin. 14 anst. tiujn liniojn — tiuj linioj, p. 20 antaŭlasta lin. de la enkonduko anst. pri tio — pro tio.

MALGRANDA REVUO aperas kvaronjare. Prezo 1 kr., je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. (inkl. sendkoston). Abono akceptata. La du nroj aperintaj en 1943 kaj nro 1/1944 estas ankoraŭ haveblaj. Redaktoro-eldonanto: Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika. Poŝtĉeka konto 26 80 23.

Peranto por Suomujo: Rektori Joel Vilkki, Somero. Poŝtĉeka konto 602 53. Prezo 12,50 mk (inkl. sendkoston. Abono por la du venontaj nroj akceptata).
